AKTUALA ESPERANTO - INFORMILO MONATA DE LA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

N° 12 / 2011 Decembro



# aktuala ESPERANTO

**36-a ELDONJARO** Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de **Esperantista Brusela Grupo**, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "*reĝa*" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Eldonisto kaj redaktisto: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; **Novaj redaktistoj ek de Januaro 2012: Samy kaj Laŭrenco Loisse, 95 Tir aux Pigeons 1150 Bruselo, laur1150 @ yahoo.fr ;** Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belgujo, 10 eŭroj jare, konto **BE64 0000 1230 4852**, BIC : BPOT BEB1; Eltiro 150 ekzempleroj.

Informoj : www.esperantobruselo.org ; aktuala.retejo.net ; br11.leadhoster.com ; ebg.skynetblogs.be ; uea.org ; paulo.retejo.net ; barelo.blogspot.com ; esperanto.net ; esperanto.be ; lernu.net ; liberafolio.org ; eo.eventeo.net

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktisto aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

Paĝo 3 - Kotiztabelo kaj Centjara Jubileo de Esperanto en Sevilo
Paĝo 4 - Poemaro: Alberto Garcia Orive, Kálmán Kalocsay
Paĝo 5 - **Jara asembleo**, oficisto de TEJO, Sarajeva SAT Kongreso
Paĝo 7 - Hercegovina Post-Kongreso
Paĝo 8 - Itala Kongreso de Torino
Paĝo 10 - Fotaro kaj Vortaro ilustrita kun desegnaĵoj

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

**Novembro 2011**

- 2 Semajna Kunveno
- 9 Semajna Kunveno
- 16 Semajna Kunveno
- 23 Bernard-Regis Larue pri Naskiĝejoj de Steloj
- **30 Jara Asembleo - ĝenerala jarkunveno de EBG**

**Decembro 2011**

- 7 Semajna Kunveno
- 14 Semajna Kunveno
- 21 Lasta semajna kunveno antaŭ Kristnaskaj ferioj

**Januaro 2012**


- 4 Semajna Kunveno
- 11 Semajna Kunveno
- 18 Semajna Kunveno
- 25 Bernard-Regis Larue pri Galaksioj

**EBG** ĝojas anonci al Vi sian **Zamenhofan Feston** okazontan sabate la **17an de Decembro** ekde la 11a horo en la Ĉambro Cardinal Mercier, unua etaĝo de la Biblioteko, 10 Placo Cardinal Mercier, 1090 Jette, tutapude la stacidomo. Detala programo estos anoncita baldaŭ, interalie en retejo < *http://www.esperantobruselo.org/drupalo/eo* >.

**Nikolao de Buyl, estrarano de EBG - Esperantista Brusela Grupo**

**Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci**





La eldonisto redaktisto de "Aktuala Esperanto" deziras al Vi Bonajn Festojn kaj Feliĉan Novjaron 2012

## KOTIZ-TABELO 2012

| Nro | Kodo | Kategorio kaj Kotizo | € | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | | | | |
| 11 | MEM | Membro de EBG | 10 | Abono al "Aktuala" (organo de EBG) |
| 12 | MEM-R | Membro-junulo (ĝis 26-jara) | 5 | + |
| 13 | MEM-S | Membro-pensiulo, senlaborulo | 7 | partopreno en la vivo de la Grupo |
| 14 | FAK | Familia kunloĝanto | 2 | Partopreno en la vivo de la Grupo |
| 18 | DVM | Dumviva membro de EBG | 250 | Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo ( 25 X MEM kotizo ) |
| BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ | | | | |
| 21 | APE | "Association pour l'espéranto" | 9 | Membro/16€ Abono al "Esperanto en Marche"/30€ subtena membreco |
| 22 | FEL | Flandra Esperanto-Ligo (FEL) | 25 | Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva) |
| UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO | | | | |
| 31 | SA | Abonanto de "Esperanto" | 38 | Abono al "Esperanto", monata organo de UEA |
| 32 | Kto | Abonanto de "Kontakto" | 23 | Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA |
| 33 | MJ | Membro kun "Jarlibro" | 25 | Membreco en UEA + "Jarlibro" |
| 34 | MA | Membro-abonanto de UEA | 61 | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato ! |
| 35 | MG | Membro kun "Gvidlibro" | 10 | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj) |
| 36 | SZ | Membro de Societo Zamenhof | 122 | Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA |
| 37 | MD | Dumviva Membro de UEA | 1525 | MA de UEA dum la tuta vivo! ( 25 X MA kotizo ) |

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2012 al konto BE64 0000 1230 4852, BIC : BPOT BEB1

## CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO EN SEVILO




**Centjara Jubileo de Esperanto en la urbo Sevilo estis festita dum la 16a Andaluzia Kongreso de la 20a ĝis la 23a de Oktobro kun 51 kongresanoj kies 3 bruselanoj.**



## POEMARO:

### VI ESTAS KIEL FLORA BUKEDO

Faritaj el jasmenoj kaj lilioj
estas viaj okuloj; el diantoj,
viaj lipoj; vangoj, el amarantoj;
dentoj, el orkideoj kaj fuksioj.

Hararo, farita el hortensioj;
korpo, el nufaroj kaj poliantoj;
manoj, el safrano kaj keirantoj;
ungoj, el tulipoj kaj kamelioj.

Via animo ankaŭ estas floro:
ruĝa rozo, de amora pasio;
flava rozo, de amora fervoro;

blanka rozo, de amora magio;
blua rozo, de amora aŭroro;
. . . rozoj plenumiĝitaj de gracio.

**Alberto Garcia Orive, 10/2011, Bilbao**

### KOROJN SUPREN!

Ho, kavaliroj de la Nova Sent',
Ni ekbruligu flamojn en la koroj,
Flugu de kor' al kor' tra l' homa gent',
Flugu la flagre festaj fajrofloroj!

Ĝemas mizere, en mallum' dronante
Tuta homaro sub malbona sorĉ',
Brilu do por ĝi ĉie, lumdonante,
Koro flamanta, kiel gvida torĉ'!

Ho, kavaliroj de la Pentekost'!
Lukti ni devas en bataloj multaj,
Jen malamikoj: la anima frost',
Blinda malam' kaj miskomprenoj stultaj.

Veoj alarmas por batal' benata,
Grandaj mizeroj vokas nin por arm':
Jen la armiloj: la laboro frata,
Brakoj brakumaj, kaj la kora varm'!

**Kálmán Kalocsay** - *1920*



Alberto kun Regina, Camarruga, 2-10.10.2010

### MEDITO

Mi, Regina, lasis pensi;
kaj, mi volas lasi senti;
Sed sen senti kaj sen pensi
kiel mi povus vivsenti?

**Alberto Garcia Orive, 10/2011, Bilbao**

### SEPTEMBRO 1939

Forĵetis do la kubon kaj la maskon
la landmanĝanta Ĉef'; la mondmiraklo:
ebrie de triumfoj sen obstaklo
surpremis al la rasa kap' la kaskon,

kaj kvazaŭ lia pugno tenus faskon
da Votan-fulmoj, inter kriĉo akra
de la Valkiroj, rajdas al masakra
batalo, por konkeri la fiaskon.

Jes, ĉu li estas plenblovita rano,
ĉu fortegul', kaj kiel Tamerlano
metigos lin el la kranioj monton,

kaj landojn plagos li apokalipse,
egale: jen mi diras la estonton:
li stumblos, falos kaj dispolvos gipse.

**Kálmán Kalocsay (1892-1976),**
**Tra la ŝtormo, 1939-1945**

## Ĝenerala Jarkunveno

Laŭstatuta **ĝenerala jarkunveno** de nia **E.B.Grupo** okazos **merkredon, la 30an de novembro 2011** en nia kunvenejo de strato VanMaerlant 2 (Ĝi estas konstruaĵo de E.U., do kunprenu vian identigilon!).

**Tagordo:**

**1.** Bonvenigo, konstato de kvorumo.
**2.** Aprobo de pasintjara protokolo.
**3.** Raporto pri la pasintjara agado kaj nuna stato de la Grupo:
= financa, fare de la kasisto.
= morala, fare de la prezidanto.
**4.** Aprobo de la kontoj kaj malŝarĝo de la nuna estraro.
**5.** Sinprezento de la kandidatoj por la estraraj postenoj.
**6.** Elekto de nova estraro.
**7.** Planoj kaj proponoj por lernojaro jam komenciĝinta kaj Zamenhof-festo.

Efektivaj membroj (kiuj, konforme al la Statuto, konsistigas la ĝeneralan membrokunvenon), estas **insiste** - kaj estraranoj **tre insiste** - petataj ĉeesti.

Kompreneble, ĉiuj kotizpagantaj membroj estas bonvenaj, kvankam sen voĉdonrajto. Angelos Tsirimokos

## Oficisto de TEJO

Eklaboris oficisto de TEJO - Tutmonda E-Junulara Organizo. Multjara deziro de TEJO pri propra dungito plenumiĝis komence de oktobro, kiam la antaŭa volontulo Manuela Ronco eklaboris kiel duontempa oficisto laŭ decido de la septembra kunsido de la Estraro de TEJO. Ŝi okupiĝos pri administraj taskoj, serĉado de subvencifontoj, pretigo de subvencipetoj kaj raportoj pri la uzo de la ricevitaj subvencioj. Ŝi laboras en Torino, Italio, kaj laŭbezone vizitos la Centran Oficejon en Roterdamo, i.a. okaze de la kunsidoj de la Estraro.



Manuela Ronco kun Sébastien Denu en Bruselo 9-12 septembro 2011, fotado de la redaktisto dum Volontula Vilaĝo: http://br11.leadhoster.com/110910/

Kiel nova volontulo de TEJO eklaboris meze de aŭgusto Sébastien Denu el Tuluzo, Francio. Lia deĵorado daŭros unu jaron.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 430, 2011-10-12

## 84-a SAT-kongreso en Sarajevo 30.7. - 6.8.2011

Unuafoje SAT kongresis en Bosnio kaj Hercegovino kaj la kvaran fojon en Balkanio. La kongreso estis bone organizita kun varia programo kaj kelkaj surprizoj. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 70 geesperantistoj el 15 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Japanio kaj Aŭstralio. La kongreso okazis en bela natura ripozejo. Dum la solena malfermo bonvenigis la ĉeestantojn la prezidanto de la OKK Fetah Zvirac kaj ankaŭ la urbestro de la komunumo Ilidĝa s-ro Senaid Memić. Poste salutis nin Ibrahim Spahić, la prezidanto de la Internacia Pac-centro. La kongreson inaŭguris la prezidanto de la Plenumkomitato de SAT Jakvo Schram. La kongresan temon "Tutmondiĝo kaj nacia fenomeno" pritraktis François Lo Jacomo. Sekvis salutoj de diversaj asocioj kaj poste fotado antaŭ la hotelo "Terme".





Nikolao Gudskov el Moskvo kun la redaktisto dum SAT-Post-Kongreso en Hercegovino

Sarajevo estis fondita en la 15-a jarcento. Ĝi riĉas je multaj monumentoj kaj aliaj vizitindaj vidindaĵoj. Promeno en malnova urbo-cento Baŝĉarŝija bone respegulas etnan, religian kaj kulturan mozaikon de bosnia socio. Nuntempe la homoj de pluraj naciecoj vivas en harmonio. En la jaro 1914 pro murdo de la arkiduko Franz Ferdinad, tronheredulo je la Aŭstro-Hungara imperio, ekestis la Unua Mondmilito. Alia trista evento, la lasta kruela milito okazis en la jaroj 1992-1995. Pri tiuj okazaĵoj ni estis detale informitaj.

Dum la kongresa semajno oni traktis kutimajn kongresajn temojn, okazis soci-politikaj forumoj, fakaj kaj frakciaj kunvenoj, kunsidis komitatoj. Okazis aktiva partoprenado kun viglaj diskutoj. Krom tio ni havis eblecon provi teknikon de kinezoterapio, aŭdi pri la sorto de bulgaraj fervojoj, diskuti pri lingva diverseco kaj utileco de lernado de fremdaj lingvoj, spekti dokumentan filmon pri Esperanto. Solena akcepto de la urbestro okazis en la hotelo mem.

Grandan intereson pri la evento montris amaskomunikiloj en la tuta lando. Aperis pluraj artikoloj en ĵurnaloj, kelkaj intervjuoj estis elsenditaj en radio kaj raportaĵoj pri la kongresaj eventoj aperis en televido. Do, miloj da homoj eksciis pri la kongreso. Nekutima dum la SAT-kongresoj, sed riĉaj estis turismaj ofertoj plurfoje ligitaj al kontraŭ-militaj eventoj. Ni vizitis militan tunelon elfositan dum la sieĝo de Sarajevo, spektis filmon pri tieaj okazaĵoj kaj rigardis malgrandan ekspozicion.

En Srebrenica, dum la tuttaga ekskurso ni vizitis la Memorcentron en Potoĉari, kiu atestis pri kruelaj kaj abomenaj okazaĵoj de la lasta milito. Malgraŭ la renovigo oni rimarkas ĝis nun spurojn: vidiĝas multaj kuglitaj domoj. Ĉe la monumento de militaj pereintoj oni metis florbukedon. En la kulturdomo de Srebrenica okazis packunsido dum kiu oni apelaciis por malpermeso de pafaĵetaĵoj el bomboj, kontraŭpersonaj minoj kaj por senminigado de Bosnio kaj Hercegovino. En Tuzla ni trarigardis la urbon kaj tagmanĝis en belstila restoracio. Interesa estis ekskurso al bosniaj piramidoj, kie ni promenis tra subteraj vojoj. Dum alia tuttaga ekskurso ni vizitis la belan urbon Mostar, mondfama pro sia ponto. Spomenka Stimec prezentis en Blagaj sian verkon, romano "Hodler en Mostar". En la kongresejo estis prezentitaj aliaj du libroj. "Eŭropa Unio - lingvaj kaj kulturaj aspektoj"

redaktis kaj prezentis Senad Ĉolić. Nikolao Gudskov el Moskvo prezentis sian libron "Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj".

Komence de la kongreso kulminis en Sarajevo festivalo de la kulturo - famaj "Baŝĉarŝiaj noktoj" . Ni ĉeestis ĝian ferman festceremonion en la urbo, en kiu prezentiĝis la plej famaj artistoj. La programon partoprenis ankaŭ esperantisto kaj profesia muzikisto el niaj vicoj Lino Markovo el Francio. Li kantis esperantigitan kanzonon "Belaj estas la mostaraj vendejoj".

Vesperaj programeroj estis variaj. Ŝatatajn "Sevdalinkoj" (populara kaj tradicia bosnia muziko) kantis por ni loka solistino de sarajeva opero Lejla Jusić. Aldoniĝis ankaŭ niaj artistoj Lino Markovo kaj Saŝa Filipović kaj loka akordionisto. Ekestis tre plaĉa kaj agrabla etoso, kiu daŭris ĝis post noktomezo. Saŝa Filipoviĉ ludis la teatraĵon "Rememoro de unu aktoro". Franjo Leveque el Francio organizis kaj gvidis ĥoron, kiu kantis dum la Internacia vespero. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al folklora spektaklo. Sur la ekstera scenejo prezentiĝis pluraj ensembloj de la kulturarta societo per kantoj kaj dancoj en belaj kostumoj. Tie ankaŭ okazis la solena fermo fare de Jakvo. Venontjare oni kongresos en Ukrainia Krimeo, urbo Jalto. **Liba Gabalda**

## LA SAT-POSTKONGRESO EN HERCEGOVINO

Sabate la 6-an de aŭgusto finiĝis la 84-a SAT-kongreso en Sarajevo. Nur kvin gesamideanoj aliĝis al la postkongresaj ekskursoj. La programon organizis kaj gvidis Senad Ĉolić. Dum kvar tagoj ni ĝuis agrablan etoson vizitante interesajn lokojn en la bela suna Hercegovino.



Hercegovina Post-Kongresa teamo: Nikolao Gudskov, Floreal kaj Liba Gabalda, gvidanto kun flava majoto Senad Ĉolić, redaktisto Paulo Branco, Eliane Apcher Billom Clermont-Ferrand Puy-de-Dôme Auvergne

Antaŭ la forveturo al la nova aventuro ni unue piedpromenis tra platan-bordita aleo kondukanta al la fonto de la rivero Bosna. Revene ni uzis kaleŝon. La programo komenciĝis postagmeze. Unue ni veturis al la lago Boraĉko, kie ni fiŝpiknikis ĉe la bordo de la rivero Neretva kaj poste ni vizitis la atraktivan urbon Konjic, kies ŝtona ponto el la 17-a jarcento estis detruita dum la dua mondmilito, sed denove rekonstruita en la jaro 2009.

Sekvan tagon, survoje al la urbeto Poĉitelj ni vizitis militan muzeon en Jablanica. Eksponaĵoj atestas pri batalo sur la rivero Neretva. Ekstere videblas restaĵoj de la detruita fervojponto. En Poĉitelj ni instaliĝis en komforta rezidejo por tranokti kaj poste ni promenis tra ŝtonpavumitaj stratetoj de la orient-stila urbeto el otomana epoko. Ĝin dominas horloĝturo, la moskeo (Hadži-Alijina džamija) kaj la mezepoka fortikaĵo el la 14-a jarcento. De tie estas bona



panoramo al la rivero Neretva kaj vasta valo. La urbeto estas deklarita de Unesko kiel Monda heredaĵo.

Survoje al la urbo Stolac ni haltis ĉe la nekropolo Radimlja por vidi mezepokajn tomboŝtonojn. En Stolac ni promenis laŭlonge de la rivero Bregava kaj poste vespermanĝis. Ĉiutage ni manĝis bongustegajn frititajn trutojn breditajn surloke.

Lunde nia grupeto admiris belan pejzaĝon en la natura rezervejo Hutovo Blato. Navigante tra kanalo sur boato observis netuŝitan naturon, kie nestas pluraj specoj de birdoj.

Ĝi ankaŭ estas unika oazo por migrantaj birdoj, por pluraj specoj de fiŝoj kaj aliaj akvobestoj. Poste ni vojaĝis al la akvofalo Kravac, kie multaj homoj baniĝis kaj ĝuis malvarman akvon dum varmega tago. Ankaŭ niaj du kuraĝuloj Nikolao kaj Paŭlo refreŝiĝis kaj vigle naĝis en la lago. Agrabla estis renkontiĝo kun lokaj esperantistoj kiuj akompanis nin. Proksime de la mezepoka urbo Ljubuŝki ni vizitis franciskanan muzeon.

Atraktiva estis ekskurso al Dubrovnik, famkonata urbo en Kroatio, situanta ĉe la Adriatika marbordo. Ĉiuj estis ravitaj pro ĝiaj pitoreskaj mallarĝaj stratetoj kaj romantikaj placetoj. Turistoj abundis. Revene ni haltis en la urbo Trebinje, kie ni renkontiĝis faman esperantiston Simo Milojević, nuntempe loĝanta tie. Kun li ni pasigis agrablajn horojn manĝante en belstila restoracio ĉe la rivero Trebiŝnjica. Tiel finiĝis la postkongresa ekskursado tra suda parto de Hercegovino. Ĝi postlasis en ni belajn rememorojn. Koran dankon al nia gvidanto Senad pro la fantastike perfekta kaj plensukcesa aranĝo! **Liba Gabalda**

## LA 78-A ITALA KONGRESO 20 - 27.8.2011

Torino estis la unua ĉefurbo de Italio. Ĉi jare oni festis la 150-an jubileon de Italio. En la tuta lando flirtis hisitaj naciaj flagoj. Festantaj homamasoj kaj multaj turistoj venis por ĝui la eventon. Jam la kvaran fojon Torino gastigis la Italan E-Kongreson. Partoprenis ĝin pli ol 250 geesperantistoj el 30 landoj. Krom multaj eŭropanoj venis gesamideanoj el Indonezio, Brazilo, Madagaskaro, Israelo, Usono. Al la ĉeftemo "Kaj nun ni estu eŭropanoj" estis dediĉita unu el la du seminarioj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolviĝo. Tio efektive okazis. La solenan inaŭguron prezidis Renato Corsetti, bonvenigis nin la prezidanto de la torina Esperanto klubo, parolis skabenino de la urbo Torino. La senatano kaj urbestro de la venonta kongresurbo *Mazara del Vallo* invitis nin ĉeesti la 79-an Italan Kongreson okazonta en Sicilio. Tie oni intencas starigi Centron por Interkulturo kaj Esperanto. La ĉefan paroladon prezentis la prezidento de UEA Probal Dasgupta.

La kongreso okazis en Villa Gualino, kie estas hotelĉambroj kaj pluraj konferencejoj. De la hotelĉambro ni havis belan panoramon al la urbo Torino bordita per Alpmontaro. Bedaŭrinde, la montoj estis vualitaj per nuboj ĝis la antaŭlasta tago. En la unua kongresa tago okazis rande de la urbo Verda Foiro simile kiel dum la UK-oj. Du seminarioj, fakaj kunvenoj, prelegoj, KER-ekzamenoj, E-kursoj kaj lecionoj de la itala lingvo, publikaj diskutoj, prezentadoj

de diversaj libroj kaj pluraj ekskursoj konsistigis la semajnan programon. Prelego pri Komenio vekis intereson kaj ankaŭ tiu pri "*Zamenhof profeto de Eŭropo*" trovis siajn adeptojn malgraŭ malfrua noktohoro. Gejunuloj havis aldonan programon, infanoj lerte desegnis, modlis kaj poste instalis malgrandan ekspozicion.
Riĉenhavaj estis ĉiuj vesperaj programeroj. Kantis la kataluna muzikgrupo "Kaj Tiel Plu", la litova familia bando Asorti, la itala profesia grupo Reverie, duopo Nane kaj Ankie el Nederlando, la sveda gitaristo kaj kantisto Martin Wiese kaj la itala romantikulo Manuel Rovere, kiu ankaŭ prizorgis ĉiujn artistojn provizante ilin per sia aparataro. Dum la Internacia vespero prezentiĝis artistoj el niaj vicoj kantante, recitante poemojn, ludante violonon, pianon, kaj aliajn nekutimajn instrumentojn. Trupo de polaj junulinoj prezentis modernajn danckreaĵojn. Ĉio-ĉi estis interesa kaj bunta spektaklo. Al la kulturaj programeroj apartenis ankaŭ prezento de du teatraĵoj. Unu originale verkita de Mikaelo Bronŝtejn "Dek tagoj de kapitano Postnikov" estis adaptita kaj prezentita de Saŝa Filipoviĉ kun aliaj du aktoroj. La dua (tradukita) teatraĵo temis pri "Roma Triptiko". Ĝi impresis iom mistere. Oni prezentis ankaŭ la filmon de Roman Dobrzinsky "Japana printempo", kiu gajnis la unuan premion en Belartaj Konkursoj. Ne malpli plaĉa estis la filmo pri Odeso kaj bildoj pri odesaj katakomboj, kiujn prezentis Tatjana Auderskaja el Ukrainio. Interesaj estis bildoj kaj libro pri Bona Espero en Brazilo, prezentita de la italbrazila paro Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia.



Laura Brazzabeni kun la redaktisto
dum itala kongreso en Lignano Sabbiadoro:
http://xurb.leadhoster.com/100821/

Pri la evento interesiĝis ankaŭ politikistoj (kun favora sinteno al Esperanto), ĵurnalistoj, televido kaj aperis kelkaj artikoloj en la loka gazeto. En TTT-paĝoj estis aperigitaj freŝaj novaĵoj. Por la kongreso estis pretigitaj du specialaj bildkartoj, kiujn oni povis stampigi per poŝta memorstampo.
Estis organizitaj kvar duontagaj ekskursoj. Oni konatiĝis kun la urbo Torino, ĝiaj muzeoj, palacoj, katedralo, botanika ĝardeno, mezepoka urbo kaj ĝia fortikaĵo, religiaj objektoj kaj simboloj de la urbo kaj vespere estis organizita vizito al astronomia observejo.
Dum la tuttagaj ekskursoj oni vizitis la urbon Verĉeli kaj apudajn kastelojn, la turisman urbon Stressa kaj la lagon Maggiore (en kiu oni vizitis tri belegajn insulojn), la valon de Susa en okcidentaj Alpoj, kie troviĝas imponaj fortikaĵoj kaj bela abatejo de Sankta Mikaelo.
Dum la ĉi-jara Itala Kongreso estis elektita nova estraro de la asocio. Ĉe la fino de la kongreso la sekretariino Laura Brazzabeni dankis ĉiujn ĉeestantojn pro ilia partopreno kaj fermis la kongreson. Venontjare oni atendas ankoraŭ pli da partoprenantoj en la bela varma Sicilio. Surloke jam aliĝis pli ol 50 gesamideanoj. Aliĝu ankaŭ vi kaj ĝuu la varman etoson en Sicilio!

**Liba Gabalda**

## SARAJEVA KONGRESO


























Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

# HERCEGOVINA POSTKONGRESO




Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda




# ITALA KONGRESO DE TORINO






Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

**Kiel ege demandite de diversaj legantoj, inter aliaj kelkaj belgaj fervojistoj de BEFA, nia bulteno publikas novajn esperantajn ilustritajn vortarajn paĝojn kun desegnaĵoj.**







komoj
kamelo
foko
cervo
polusa urso
testudo
rostro
rinocero
elefanto
bubalo
kastoro
kapro
zebro
serpento
šarko
baleno
tigro
leopardo



# La cirko


šnurdancisto
stang
trapezo
unuciklisto
strečita šnuro
šnurštupetaro
sekurreto
akrobatoj
kuniklo
cirkestro
jonglisto
hundo
rulringo
cilindra čapelo
banto
blovorkestro
sensela rajdarto
kaŭno


Nombroj
Koloroj
Formoj
Vetero
La kermeso
Sezonoj




Tagoj
dimanĉo
ĵaŭdo
mardo
sabato
lundo
merkredo
vendredo
kalendaro
mateno
vespero
suno
nokto
luno
stelo
kosmo
planedo
kosmoŝipo
teleskopo






## FRANCISCO JAVIER MOLEÓN GARCÍA



Membro de EBG - *Esperantista Brusela Grupo*